

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penco.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 105 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio.

10 Marto 1929

NEW ZEALAND ESPERANTO CONFERENCE.

Dominion Association Formed.

The New Zealand Conference of Esperantists, which took place in Wellington on 26th January last, was attended by an enthusiastic gathering, among which were four delegates representing clubs and societies. Unfortunately, the Christchurch Esperanto Society—a very strong and active body—was unable to arrange for its representation. The conference was convened by Mr. C. J. Adcock (Te Uku, Māhānui) and arranged by the Wellington Esperanto Club. Mr. W. L. Edmanson (Wellington) presided and Mr. Wm. H. King (Wellington) acted as conference secretary.

In view of the fact that Wellington Esperantists predominated the conference, the question of voting powers of the attendance was raised. Mr. Jack (Wellington) moved that the discussion be open, and that in the event of any voting taking place, all persons present would be eligible to vote, those matters being carried to be referred to the various groups and clubs for their consideration and replies. Mr. Dewar (Masterton) seconded, and the motion was carried unanimously.

Mr. Adcock then delivered a splendid address, bringing forward many solid reasons for the establishment of some central body or organisation to control the Esperanto movement in New Zealand, which is rapidly becoming too large for individuals to

carry on. The speaker outlined the lines of future activities, and, seconded by Mrs. Watkin (Auckland), moved "that a New Zealand Esperanto Association be formed."

Mr. Jack thought that steps should be taken to investigate the establishment of the Association, and moved as an amendment "that steps be taken to accomplish the establishment of a New Zealand Esperanto Association." Mr. Dust (Wellington) seconded. Mr. Adcock withdrew his original motion, and Mr. Jack's motion was carried unanimously.

Mr. Adcock moved that the proposed association consist of three kinds of members—Members paying £1 per annum, subscription to include fees to the U.E.A. and La Suda Kruco; Junior Members paying 7/6 per annum, 2/6 of which would be a subscription to "Junularo"; and Supporting Members, paying 5/- per annum, who would receive the journal "International Language." Mr. Jack seconded pro forma.

As an amendment Mr. Dewar moved that there be two categories of members—active and associate—the yearly subscription for each being 2/6 without any magazine. Mr. J. McGuigan (Wellington) seconded. Mr. Adcock withdrew his motion, and the amendment (now the original) was carried by ten votes to nil, every vote not being cast.

Mr. Dust moved, seconded by Mr. Potts (Wellington) that the rules of the previous New Zealand Esperanto

Association be considered as the basis of the rules for the proposed association.—Carried unanimously. The rules in question were then read to the meeting and certain minor alterations were agreed upon.

Mr. Adcock moved, seconded by Mr. Dust, that the objects as set out for the old N.Z.E.A. be received en globo for the new association.—Carried.

All the above-mentioned matters having been thoroughly discussed, Mr. Alcock moved "that an association to be named 'The New Zealand Esperanto Association' be, and is hereby formed, and that those present become members thereof; and all persons present and those joining within three (3) months of receipt of the report of this meeting be recognised as the foundation members of the association." Mr. Dust seconded, and the motion was carried unanimously.

The following were elected as officers of the Association:—Patrons (subject to their approval being obtained): The Prime Minister of New Zealand, Sir Joseph Ward, P.C., K.C.M.G., L.L.D.; Sir Robert Stout, P.C., K.C.M.G.; and Sir George Fowlds, C.B.E. President: Mr. C. J. Adcock; Delegate of the Universal Esperanto Association, Te Uku, Hamilton; Vice-presidents (subject to the approval of two absentees being obtained): Mrs. E. M. Watkin, Secretary, Esperanto Society, Auckland; Mr. L. E. Dust, Delegate of U.E.A., Wellington; Mr. J. S. Russell, President, Esperanto Society, Auckland; and Mr. N. M. Bell, M.A., Secretary, Esperanto Society, Christchurch. Hon. Secretary: Mr. Wm. H. King, Vice-delegate of U.E.A., Wellington. Treasurer: Mr. E. C. Jack, President, Esperanto Club, Wellington. Other officers: Mr. Adcock moved that each local group have the right to appoint a delegate who will be considered as a member of the executive of the Association. Mr. McDonald (Wellington) seconded.—Carried.

Votes of thanks to various persons and a special vote to Mr. J. S. Russell (Auckland) for sending copies of the rules of the old N.Z.E.A., and to Mrs. Watkin for bringing them were accorded and carried by acclamation.

After congratulating the assemblage on account of the manner in which the business was conducted and for the splendid Esperantist spirit displayed throughout the whole of the Conference, the president declared the Conference closed.

In the evening of the day of the Conference, a social welcome to the visiting delegates was tendered by the Wellington Esperanto Club, the function being well attended and an unqualified success. Mr. E. C. Jack presided. Supper was served and the following toasts were honored:—"The King," "Our Guests," "The U.E.A. and the B.E.A.," "The N.Z.E.A.," and "The N.Z. Groups." Included in the very fine musical programme were two gramophone records of addresses delivered in Esperanto by Dr. E. Privat, recitations ably given by Mr. W. L. Edmanson, and an accordion selection by Mr. J. McGuigan.

RADIO-KONCERTO EN BRISBANO

La 4-an de februaro, el la stacio 4QG de la Kvinslanda Gubernio, la Brisbana Esperanto-Societo donis malgrandan koncerton, de la 8-a ĝis la 8,30 vespere. La koncerto estis bone aŭdata en diversaj partoj de Kvinslando kaj en la Norda-Riveroj-regiono de la gubernio Nova Sud-Kimrujo; sed pro la malbona sezono la koncerto estis malmulte aŭdata en aliaj gubernioj.

Pro neevitebla foresto de la prezidanto (sinjoro Kidd), la enkonduka parolado pri Esperanto kaj Paco estis iegata de unu vicprezidanto (sinjoro Hyde), kiu ankaŭ anoncis la numerojn de la programo, en Angla kaj Esperanto.

La koncerton tre sukcese kaj laborplene aranĝis la muzika direktoro (sinjoro H. H. Hutton) kaj la sekretario (fraŭlino Carrick), al kiuj la societo ŝuldas koran dankon.

Jen la programo: Enkonduka Parolo: Esperanto kaj Paco. Internacia Himno: "La Espero": La Ĥoro. Kanto: "Siberia Lulkanto": fraŭlino Eva Bowen. Kanto: "En la Silenta Hor" (Ofte in the Stilly Night): sinjoroj Walter Land, Slava Popolkanto: "Mi Eliras": sinjorino de Pclotynski. Rusa Romanco: "Pokalo": sinjoro P. Smikov. Psalmo 84: "Kiel Carmaj estas Viaj Loĝejoj": fraŭlino Grace Brown. Kvarteto: "La Soldata Adiaŭ": fraŭlinoj E. Bowen kaj M. Young; sinjoroj Land kaj Hutton. Kanto: "Robin Adair": sinjorino T. Benussi. Korda Kvarteto: "Interludo laŭ Antikva Modo" (Glazunov). Ĥorkanto: "Goju, Goju Ni, Kolegoj" (Gaudeamus Igitur).

KURSO PER TRADUKADO. (kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.)

Interesatoj turnu sin al Miss Blyth,
10 Victoria-av., Surrey Hills, E10.

TRADUKO 10.

Oni (2) aŭdas la profundan ŝveladon (3) de orgeno, kaj ankoraŭ unu fojon oni sentas sin transportita (4) malproksimen for de la sovaĝejo.

Elpaŝu en la sunlumon kaj jen devene oni (2) estas en Aŭstralio. Gaja indiĝena infanaro kun plenstreĉa kriegado ludas futbalon (5) sur (12) kampo proksime al malgranda elŝipa kabano, kiu tie staris jam de la jaro mil-okcent-kvardek-sesa kaj estis la ĝermo de la nuna impona kolonieto. En apuda ŝaftondejo oni trovas maljunan indiĝenon, lerte tondantan (6) ŝafon. Li estas loĝinta ĉe la misiejo jam de la jaro mil-okcent-sepdek-tria kaj povas flue paroli ne nur la Anglan sed ankaŭ la Hispanan lingvon (7).

New Norcia ne estas nur pentrinda (14). Ĝi havas du lernejojn, el kiuj unu estas por knaboj kaj la alia por knabinoj. Monahinoj el Societo de Sankta Josefo instruas la knabinojn, kaj monahoj el Societo de Maria la knabojn. Tie estas ankaŭ misiejo por la zorgado pri miksrasaj orfoj el nordaj kaj malproksime orientaj regionoj. Vidante (8) la infanojn ĉe iliaj taskoj kaj ludado oni konstatas, kiel homama estas la laboro farata (6) de la misiistoj pro tre malfavorata klaso de homoj.

Oni poste tenas multajn memoraĵojn pri tiu unika, memstara kolonieto ĉe Nova Norcia. Se oni deziras aĉeti vinon, la monahoj povas plenumi la mendon. La vinbergardenoj kaj vinoj de Nova Norcia estas bone konataj en Okcidenta Aŭstralio. Se oni deziras kvieton oni trovos ĝin en la malvarmeta preĝejo, kie staras la marmora tombo de la fondinto (13), episkopo Salvado, kaj gastamaj (9) oni trovos la misianojn, ĉu ili estas Hispanaj ĉu Aŭstralianaj.

La Fino.

GRANDFAMA ESPLORISTO.

En la jaro mil-okcent-dek-kvina, en la Angla provinco Yorkshire (elp; jorkŝir) naskiĝis Edward John Eyre (elp; ejr), unu el la plej grandfamaj el Aŭstraliaj esploristoj. Lia patro, kiu estis pastro, unue intencis, ke la knabo fariĝu armea oficiro, sed je la aĝo de dek ok jaroj malsukcesinte

(8) ricevi priesperatan (6) komision oficiran, la junulo migris Aŭstralion, kie li fariĝis ŝafedukisto (10) kaj rapide akiris riĉon. Li kelfoje vojaĝis tra la nekonata (6), sovaĝa regiono en la sudo de la insula kontinento, transmovante (8) brutarojn el Nova Sud-Kimrujo en la lastatempe fonditan (6) kolonion Suda Aŭstralio. Li fariĝis unu el la plej elstarantaj (6) homoj en tiu nova kolonio, kaj antaŭ ol atingi la aĝon de dudek kvin jaroj li estiĝis pacjuĝisto (11) kaj plenumis tiun oficon kun granda takto kaj kapablo ĉe kvietigado de kvereloj inter la kolonianoj kaj indiĝenoj.

(daŭrigota en la Maja n-ro.)

NOTARO 10.

1. Skriberaroj. Trad. 8; kol. 1, L 26, post "brilkoloraj" enskribu "krotonoj"; 2. "You" en la Angla ofte havas la sencon de "one" (oni). — 3. "swell," komp.: "la kanto ŝveladis grade" (Grabowski en "La Konkundanto" 123/7.) — 4. Predikata partícipio. Notaro 1/7. — 5. aŭ "piedpilkon." — 6. Adjektiva partícipio. Notaro 1/20. — 7. Aŭ oni povus diri "paroli kaj la Anglan kaj la Hispanan" (both English and Spanish) aŭ "paroli kiel la Anglan lingvon tiel ankaŭ la Hispanan." Komp.: Fab. de And. Pt. 1, 136/2 kaj Mart. 72/27. — 8. Adverba partícipio, notrao 2/10. — 9. Predikata adjektivo, Notaro 1/10. — 10. "eduki" havas pli ampleksan signifon ol la Angla "to educate" (en la senco de "instruadi, lernigi, klerigi"). Oni edukas (brings up, rears, raises) infanojn, ĉevalojn, ŝafojn, bovojn, porkojn, kokinojn k.t.p. "Brutedukisto," "keeper of live stock" (Gen. xlvj, 32). "Ŝafedukisto," aŭ "ŝafpaŝtisto," sheep farmer. (Gen. iv, 2). "Bredi" (vorto ankoraŭ ne oficialigita) ne estas samsignifa kiel "eduki" sed signifas "to breed as a business pure-blooded animals." 11. "magistrate." Ne uzu "magistrato" en la ĉi-tiea senco. Ĝi havas tute alian sencon (the authorities of a municipality, city or town). Komp.: Rab. de Bah. 22, 1, 15, Mill. — 12. aŭ "en." — 13. Substantiva partícipio. Cox 209. — 14. Oni ofte en la literaturo vidas "pitoreska," sed ĝi ankoraŭ ne estas oficialigita.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

Gordon F. Piera, Melbourne. Korajn Gratulojn. (Red.)

ESPERANTO.

Its Origin and Rise.

It has been decided to hold a congress of Esperantists in Perth during the centenary year. Esperanto being the international auxiliary language, it has many adepts among European and Asiatic nations. The need of an international language is not so necessary in the Dominions as it is in parts of the world where nations rub shoulders with other nations. It was this proximity of different speaking peoples in central Europe that caused the invention or formulation of Esperanto.

The author of the language was a Polish doctor—Zamenhof by name—who was born and lived in Bielystok, a small Polish town inhabited by at least four different speaking races. Complications and disputes were of daily occurrence, and young Zamenhof, who was greatly troubled by these happenings, conceived the idea of an international language. After ten years of intensive labour he produced, in 1887, his first text book and grammar. At that time a few enthusiasts were the only students of Esperanto. During the intervening forty-two years the growth of the language has been remarkable.

The official headquarters of Esperanto are in Geneva, where the Universal Esperanto Association functions. This organisation has delegates—or consuls—in almost every country in the world; these delegates now number 1,800; their duty is to meet visitors from foreign parts and to assist them with information about the city and country in which they are found. They also act as foreign correspondents to the central body, sending statistics and information regarding trade and commerce and other matters of international interest.

It is easy to realise that Esperanto may be, and possibly is, of great value as a ready means of communication in commercial and other matters. As an auxiliary international language it is officially recognised by the League of Nations. Delegates are stationed in Perth, Adelaide, Melbourne, Sydney, Brisbane, New Guinea, and New Zealand; and societies exist in all the States for the study of Esperanto and the transaction of international business. In European countries Esperanto is widely used by the administrative bodies of exhibitions—or fairs—as they are styled,

such as the well-known Lyons, Leipzig, Dresden, and Nuremburg Fairs, which are held in the spring and autumn of each year.

The Japanese, especially, among Asiatic nations have readily adopted Esperanto as the international language. It is taught in most secondary schools in the principal Japanese cities. From a literary point of view, Esperanto has reached a stage where its possibilities demand serious attention and consideration. Magazines and newspapers printed in the language now number about sixty-four distinct publications. Important works by eminent writers in all countries are immediately translated into Esperanto, and circulated all over the world. A recent publication is that of Professor Sir Arthur Keith's much-discussed address on the "Origin of Man." A few well-known writers discovered that it pays to write original works in Esperanto. It is obvious that a world-wide circulation must be more profitable than a merely national one.

For many years past Esperantists have held annual international congresses in various large cities. Apart from these, it is customary to hold a national congress in most countries where Esperanto is spoken. The last Australian Congress was held in Melbourne, at which most of the business and addresses were carried on in Esperanto. From an advertising point of view the holding of a congress in Perth will undoubtedly be of considerable value to the State. It is expected that visitors from all parts of the world will be present, and reports of the proceedings will receive world-wide publication in Esperanto.—H.B.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Argentina Esperantisto, 28-29; Arbeiter-Esperantist, 1; British Esperantist, 286; Belga Esperantisto, 8-9; Bulteno de Internacia Scienca Asocio E., 13; Esperanto, 1; Germana Esperantisto, 1; Heroldo de Esperanto, 51, 52; Hungaro Heroldo, 8; Inform-servo de la Internacia Labora Oficejo; Internacia Esperanto-Servo, 8-10, 11-12; International Language, Jan.; I.S.K., 1; La Revuo Orienta, 1; Libro, 27; Oomoto Internacia, 25; Revuo Kultura, 2; Svenska-Tidningen, La Espero, 11-12, 1; Weekly News Bulletin, V.O.K.S., 46-47.

KRONIKO.

BRISBANO (Kvinslando - Queensland). — La societo kunvenas jam en nova salono, 59a Elizabeth-str: Kvan-kam ĝi ne estas sur la ĉefa strato, ĝi estas pli facile trovebla; plie super la stratpordo, elpendaĵo kun verda stelo kaj la nomo de la societo estas konstanta deklamo.

Pri nia radio-koncerto vidu la apartan raporton.

La 22 januaro tri anoj de la societo legis la amuzan komedion "Rozalio," kiun la (bedaŭrinde nemultaj) ĉeestantoj tre ĝuis. La rolojn legis sinjoro Hyde (sinjoro Bol), sinjoro Miŭs (sinjorino Bol) kaj sinjoro Behncken (Rozalio).

MELBOURNE, Vic. — Post la laboro de transloĝiĝo, la klubaj aferoj komencas progresi tre kontentige, kaj la membraro pligrandigas ĉiun kunvenon. La kunvenoj nun okazas je la mardo vespere, kaj al tiu ŝanĝo ni atribuas la bonan progresadon. La nova adreso de la Melb. Esp. Societo estas, Cambro 3, "Temperance Hall," 172 Russell Strato.

En Januaro okazis ekskurso al la Lago de Eduado. La vetero estis tre varma, sed agrabla venteto kiu blovis trans la lago, faris kelkhoran restadon sub la arboj ĉe la lagbordo, tre ĝuebla afero. Tiel opiniis la aro de Esperantistoj, kiu babiladis inter si, kaj rigards la naĝantojn kiuj amuzis sin en la akvo.

AUCKLAND, Nov-Zelando. — Nia agema propagandisto, S-ino B. King, elportis tre utilan laboron—laŭ la nombrego da libroj venditaj — por nia kara lingvo dum pasinta monato, kiam ŝi aranĝis la aperon gazete de diversaj artikoloj pri Esperanto kaj por la elmontron de afiŝoj en multaj el la plej grandaj bultikoj urbaj.

La loka Societo, kiu ankoraŭ ne refunkciadas por la nova jaro, estis reprezentita en la Nov-zelanda Esperantista Konferenco, kio okazis en Wellington dum 26a Januaro. La Societa sekretario, S-ino Watkin, partoprenis. Skribdate, la anoj ankoraŭ

ne havis okazon pridiskuti la detalojn de la Konferenco.

MASTERTON, N.Z. — La grupo ĉi-tiea komencos /is kunveni je la fino de la kuranta monato (Februaro). La sekretario, S-ino L. Payne, 8 Bruce Street, Masterton, estas tre kontenta pri la laboro farita dum pasinta jaro, kaj raportas atendon por eĉ pli sukcesa dum la nuna jaro. S-ro A. Dewar, klasgvidanto, estis la grupa delegito al la Konferenco de Esperantistoj okazita en Wellington lastan monaton.

Kvar el la anoj de nia grupo malgranda subtenadas la S.K. per abono, la gazeto estas treege ŝatata nialoke.

S-roj E. C. Jack kaj L. E. Dust, bone konataj samideanoj kaj oficposedantoj de la Wellington Esp. Klubo, vizitis nian urbeton dum la festotagoj kuragiĝante nin.

HAMILTON, N.Z. — Dum Januaro okazis al nia societo granda honoro — la elekto de nia ano, S-ro C. J. Adcock, Del. de U.E.A., kiel unua prezidanto de la Nov-zelanda Esperano Asocio. Daŭre kaj diligente laborante por Esperanto, ĉiame pensante kaj agadante por la lingvo, S-ro Adcock bone meritas la honoron kaj fidon, kion oni esprimis je li. Ni gratulas lin kaj la konferencanojn kiuj elektis lin al tia grava kaj respondeca ofico.

En la Somera Lernejo por instruistoj okazita Januaron ĉe Oamaru, S-ro Adcock partoprenante lekiadis al siaj gekolegoj pri Esperanto, ricevante tre simpatian aŭdodon. Ankaŭ ĉe balo Somerlerneja la lingvo estis reprezentita — fraŭlino portis grandlitere la vorton "Esperanto," kaj kvin sinjoroj kun verdaj rubandoj formigis la grandan kaj belan stelon.

CHRISTCHURCH, N.Z. — Diversaj anoj de nia Societo brodkastas ĉiusessemajne de stacio 3YA. F-ino Corkill, la 17an Decembron parolis pri li disvastigado de Esperanto per la radio kaj la filmoj. Dum 28a Januaro, S-ro Alastair More pritraktis sian propran travivon rilate al la

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? rizorgas mendojn per poŝto. Memoru - facila por via monujo. Li speciale p

ia adreson

Specialisto pri Fontanplumoj

Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

lingvo. S-ro Geo. Wheeler, D.B.E.A., parolas dum la 11a Marto.

La klaso rekunvenas komencinte novan jaron je la 12 Februaro. Laŭ ĉiuj indikoj ĝi duobligos sian membraron ĉi tiun jaron. Por starigi liberecon de interesaj Esperantaĵoj, ni decidis kontribui po tri pencojn semajne.

Kvankam ni esperis ke du delegitoj estus reprezentantaj nin en la N.Z. Konferenco, ĉe Wellington, bedaŭrinde niaj esperoj ne realiĝis. En lia foresto, nia sekretario, S-ro N. M. Beli, M.A., estis elektita kiel unu el la kvar vice-prezidantoj, kaj lin ni gratulas.

Vizito de S-ro B. Potts, F.B.E.A., (Sek. Esp. Klubo, Wellington), treege ĝojigis nin dum la festotagoj.

La gazeto "International Sunbeam" daŭras sian reklamadon por Esperanto per speciala sekcio en ĉiu eldono, kio enhavas artikolojn pri kaj en Esperanto.

WELLINGTON, N.Z. — La pasinta monato estis okupo-plena por la loka klubo pro la okazigo en nia urbo de la N.Z. Konferenco Esperantista, pri kio detala raporto aperas alikolone. La bonega laboro de la kluba sekretario kaj prezidanto certigis la sukceson de la konferenco, al kio ni bonvenigis samideanojn el aliaj lokoj.

La klubo rekomencis siajn agadojn por 1929 je la 29a Januaro. Estas kontentige noti la aliĝon de novaj anoj. La dua kunveno okazis la 5an Februaron, kiam Gesinjoroj Payne, el Masterton, plujaj membroj novaj vizitis la klubon.

KRONIKO EL SYDNEY.

Parolado de S-ro Matternin, titolita, "La Natur-amiko Movado en Eŭropo," estis tre interesa. Tiu ĉi samideano, kiu ĉiam interesigas sian aŭdantaron, tre bone priparolis la supre-nomitan movadon, kiu, li diras, celas konduki la popolon al plena kompreno de, kaj amo al, la Naturo. La celoj de tiu ĉi movado estas kaj zaniga, kaj edukaj. Plej multaj Eŭropaj laboristoj, vivantaj en grandaj urboj, sentas la mankon de la belaj naturo en sia vivo, kaj penas forigi tiun mankon per ekskursoj en la kamparon, science elektita manĝitaro, k.t.p. La paroladisto rakontis pri la diversaj klopodoj de tiu ĉi kreskanta movado en tuta Eŭropo, menciante, inter aliaj la nudkorpaj kultoj, la vegetaristoj, kaj aliaj.

Aliaj paroladoj de la monato pri-traktis la internaciismon. Fino. An-

derson lekciitis pri "Internaciismo," kaj montris, kiel la mondo kvazaŭ malpligrandigas, pro la multaj modernaj elpensitaĵoj, kiel la radio, aviado, k.t.p. Si diris, ke en pli antikvaj tempoj la diversaj popoloj ne tre multe komunikis inter si, sed iom post iom, pro multaj diversaj kaŭzoj, ili devis forlasi la malnovan izolecon, kaj la tempo venas, kiam la nacioj de la mondo fariĝos aro de fratoj. Tio estos necesa, kaj granda helpo al tiu celo estos la internacia lingvo, Esperanto.

La alia internaciisma parolado estis pri "Esperanto kaj la Ligo de Nacioj." En tiu okazo la paroladisto estis la vigla prezidanto, Dro. Williams.

La programo por la venonta duonjara enhavas multajn interes-aspektaĵojn. La paroladantoj estas homoj el kelkaj diversaj nacioj, kaj temoj kiuj devus havi iom de intereso per ĉiuj ĉeestantoj estas sur la programo.

PRI ŜANĜOJ.

En Majo 1907 en ĉiuj Esp-aj ĵurnaloj aperis grava artikolo de d-ro Zamenhof "Pri reformoj en Esp-o," en kiu li diris: En la lasta tempo inter la Esp-istoj kuras la famo, ke mi intencas reformi Esp-on. Tiu-ĉi famo, kiu povas fariĝi tre danĝera, estas absolute malvera. Mi neniam intencis arbitre reformi la lingvon, ĉar tio-ĉi ne sole estus pereiga por nia afero, sed mi havas por tio nenian moralan rajton. . . Oni scias, ke de la momento, kiam mi en la jaro 1889 fordonis mian mastrecon, mi neniam permesis al mi fari propravole en la lingvo ian ĉi plej malgrandan ŝanĝon. Se mi per faris tion, ĝis nun, tiom pli mi certe neniam ekdeziras fari tion nun, post la Buljona Deklaracio . . . La Esp-istoj povas esti tute trankvilaj: mi neniam surprizos ilin per ia arbitra ŝanĝo en la lingvo, por kiu mi, simile al ĉiu alia Esp-isto, jam de longe havas nenian rajton; neniam mi altrudos al ili mian personan deziron; kaj se eĉ mi volus iam freneze fari tian senrajtan kaj pereigan faron, ĉiuj Esp-istoj povas kontraŭmeti al mi la Buljonan Deklaracion kaj diri: Ni ne permesas . . . Nia ŝipo estas nun en la mezo de la maro! Ĝi iras bone kaj ĝi naĝas bonorde al sia celo. Tial ni gardu nin fari kun ĝi iajn ajn eksperimentojn kaj elvoki malpacon inter la ŝipanoj en la maro! Ni atendu, ĝis la ŝipo venos al la haveno!

L'INITIATION A L'ESPERANTO.

Jen bona Franclingva enkonduko por ĉiuj ne ĝuste sciantaj pri Esp-o. Verkita de la konata kompilinto de "Provo je Marista Terminaro," Rollet de l'Isle, la 78-paĝa broŝuro enhavas 4 partojn; (1) Kio estas Esperanto? (2) La Historio de Esp-o kaj la vivo de Zamenhof; (3) Organizo kaj nuna stato de la movado; (4) la propagando. Tiuj siavice dividiĝas sub kernecaj indiklinioj. Facilvideble estas, ke ĉiu paĝo elplumiĝis per mano de firmega fidanto al fina, eĉ nemalbaldaŭa venko, tamen la sekcio pri niaj jamaj impresoj ĉe diversaj homagadaj fakoj estas verkita laŭ altkontentige modera takso.

Jen kelkaj notindaj liniaroj tradukite el vere lumiga kompilaĵo. "Esp-o estus por la Ligo de Nacioj la plej forta garantiaĵo por ĝia daŭrigata ekzisto, ĉar, kiel la sperto jam pruvis, tiu lingvo kreas novan spiriton, 'la spiriton internacian, kiu tamen ne estas internaciismo, sed kiu konsistas en kompreno kaj forta sento, ke la lando al kiu oni amas antaŭ ĉiu alia, ne estas izola, sed ke ĝi havas sian lokon en organismo superanta ĝin; ke almenaŭ kelkgrade ĝi estas nur radeto de granda meĥanismo, kiu devas funkcii por la komuna bonestado ĉiu, celanta la daŭrigon de la paco."

Ĉu vere, "ĉiu vorto (en Esp-o) havas nur unu solan signifon"? Kp. akt, firm, daktil, atlas, artikol, mark, sekund kaj aliajn. Pri la Majstro: "jen kio pli valora (ol nura filologecko) — ĉar ankoraŭ neniu filologo kapablas krei verkon similan al lia — dotita li estis per eksterordinara instinkto lingvistika kaj estis samtempe profunde poeto; prefere ol obei regulon, kiu devigus lin akcepti nomojn al li neplaĉajn, li plivolis doni al sia lingvo iun ĉarmon kaj harmonion, kiu faras ĝin ilo, kies praktiko donas veran plezuron intelektan, kaj forte helpas al ĝia disvastiĝo Ĝia kreinto estis samtempe lingvisto, artisto kaj poeto; estas ĉi tiu tiel eksterordinara kuniĝo de kvalitoj, kio faras Esperanton verko neimitebla."

"La Babel-legendo tre frape komprenigas pri la forta flugsalto, kiun farus la scienco kaj teĥniko, se tiu denaska malpovo (la prolingva mutecko) estus forigita; la legendo malkaŝas al ni la diojn timigitajn vidi, ke la homoj povas prirabi eĉ iliajn sekretojn, se ili daŭrigis paroladon per komuna lingvo." Krome, ĉu ne

frapante estas konstati, ke la ideo pri la teruraĵoj sekvontaj la diversigon de la parolado trudokupis la homajn spiritojn jam en la originoj de nia historio?"

La verketo meritas facilan vendon en Franclingva teritorio, kaj lernantoj trovos ĝin tre bona ekzerc-materialo.

Prezo: ses penceoj ĉe Belga-Esperanto-Instituto, 11Rue de Petit-Chien, Antverpeno.

(Robo.)

EL "A SHROPSHIRE LAD."

De A. E. Housman.

Se ver' en koraj povus
el alto savon porti,
plej certe mia amo
vin farus jam ne morti.

Ho, se volado forta,
se sola penso savus . . .
se mortus mondo morgaŭ,
la tombo vin ne havus.

Ci longa korinklino,
senlima simpati' . . .
ho, vivus vi por ĉiam,
se estus help' en ĝi.

Jam vane! Do kompatu
al koro tiu ĉi,
ĝis vi veturos urbon,
kie sola restos vi.

Tradukis A. Delsudo.

ESPERANTO AND THE POST OFFICE.

In view of the next Universal Esperanto Congress, which will be held at Budapest in August, 1929, the Hungarian Ministry of Posts, Telegraphs and Telephones has authorised Esperanto classes for the officials of the service.

The People's Commissariat for Posts, Telegraphs and Telephones of the Union of Socialist Soviet Republics has recently announced the issue of a number of commemoration stamps with inscriptions in Russian and Esperanto, including a 28 kop. stamp in memory of Tolstoy and two stamps issued for benevolent objects of 1 and 2 roubles respectively.

—I.E.S.

NEKROLOGIO.

Kun sincera bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de jenaj samideanoj. Al iliaj familioj ni sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

SinJORINO A. Scammell. Per la morto de sinJORINO A. Scammell je la 5-de Februaro, en Mater-Misericordiae-hospitalo, Brisbano post longa kaj turmenta malsano, la Aŭstralia movado perdis unu el siaj fidelaj subtenantoj.

SinJORINO Scammell estis konata al multaj samideanoj en nia kontinento, kaj en 1924 partoprenis la universalan kongreson en Vieno.

SinJORO T. O'Leary, 85 jara, mortis en sia hejmo ĉe Oakleigh. Nur unu horo antaŭ lia morto li laboris en sia bela ĝardeno. Li estis tre entuziasmo Esperantisto kaj instruis nian lingvon al junuloj ĝis liaj lastaj tagoj. Kiel soldato li servis al sia Reĝo en Hindujo, Sudafriko, kaj Gibraltaro, kaj antaŭ ne longe estis unu el la urbestaro ĉe Oakleigh.

ESPERANTO AND TOURING.

In connection with the Twenty-first Universal Esperanto Congress which will be held in Budapest from 2nd to 9th August, 1929, the Budapest Tourist Office has issued a prospectus in Esperanto, and also a profusely illustrated folder in the same language entitled: "Budapest, the Queen of the Danube."

It has also distributed a very artistic poster referring to the Congress, which will, no doubt, like previous congresses, attract participants from all parts of the world.

—I.E.S.

BOOKS YOU SHOULD READ.

Abismoj (Jean Forge)
Paper Covers 3/3
Aladin . . (Cox) . . Paper 6d.
Aŭstralia, Lando kaj Popolo
Delsudo kaj Laiho 7/6
La Biblio 7/6, 10/6, 15/-, 25/-
(According to paper and binding)

Dancu Marionetoj (Baghy) 2/9
La Faraono (Prus), in 3 Parts
Paper Covers 7/6 set.
Lilio . (Sinnotte) . Cloth 2/9
Luno de Izraelo (H. Rider Haggard)
Paper Covers 5/6.
Postage Extra.

**LA BIBLIOTEKISTO, Melbourne Esperanto Society,
BOX 731 F., ELIZABETH ST. POST OFFICE, MELBOURNE.**

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni kvitancas la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—(la daton post la nomo kaj sumo montras al kiu dato la abono estas pagata). W. A. F. Thomas, 4/6, Jan. '30; C. W. Ballard, 5/-, Dec. '30; A. Saar, 5/-, Junio '29; F. J. Butler, 5/-, Aprilo '30; C. J. Sharpe, 5/6, Marto '30.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road. Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance" kaj apud oficejo de "Beckett's Budget." Prezidanto: Klement Kidd. Viceprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Cayrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Queensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.